

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio, pri la centjareco de Ruĝa Kruco. Vi aŭdas la trian prelegon pri tiu temo.

Ekde la fino de la dekseca jarcento aperas figuroj, kiuj pensigas al la fondintoj de Ruĝa Kruco. Mi hodiaŭ parolos pri kelkaj el ili.

En 1586, ĉe la baziliko Sankta Petro en Romo, Kamilio de Lellis sin konsekris al Dio, kun kelkaj adeptoj, por flegi malsanulojn. La kongregacio de la Kamilianoj migris el Italio al Hispanio, kie ĝiaj klerikoj konatiĝis sub la nomo de « Patroj de la bona kruco », tio, ĉar ili estis adoptintaj kiel distingilon ruĝan krucon sur siaj vestaĵoj. Angla historiistino, Cecilia Oldmeadow, priskribis la historion de tiu kongregacio en libro titolita « *The first Red Cros* » (La unua Ruĝa Kruco). La kamilianoj multfoje akompanis armeojn por savi kaj flegi la vunditojn sur la batalkampoj, vunditojn kutime forlasitajn sen helpo. La kongregacio de la kamilianoj do, per sia agado kaj per sia distingilo, anoncas la Ruĝan Krucon.

En Reims naskiĝis en 1611 vera anoncanto de Henry Dunant. Li nomiĝas Pierre Bachelier de Gentes. Dum bataloj, kiuj okazis ĉirkaŭ lia naskiĝa urbo, li helpis la vunditojn, kiuj kuŝis forlasitaj. Li ilin portis sur sia dorso kun la helpo de kelkaj kompatemuloj, petante nutraĵon por tiuj malfeliĉaj soldatoj. Plurfoje, piede, li trairis la batalkampojn, liberigante homojn, kiuj estis premitaj sub mortintaj ĉevaloj, kaj helpante tiujn forlasitojn laŭ sia povo kaj kapablo, tio, sen okupiĝo pri ilia deveno. Mi ripetis la nomon de tiu pac-hero, por ke vi ĝin bone memoru : Pierre Bachelier de Gentes.

Dum la deksepa kaj dekoka jarcentoj sufiĉe granda nombro da konvencioj subskribitaj de interbatalantoj formulis klaŭzojn, kiuj rilatas kun la traktado de la vunditoj, malsanuloj kaj eĉ foje kiuj proponas disponojn por la protektado de la civilaj loĝantaroj. Germana ĥirurgo nomata Gŭrlt rikoltis la tekstojn de tiuj konvencioj kaj ilin publikigis sub la titolo « *Zur Geschichte des internationalen und freiwilligen Krankenpflege im Krieg* » (Por la historio de la internacia kaj libervola malsanulflegado dum militado).

Inter tiuj konvencioj ni menciis la akordon de 1743 inter grafo de Stair kaj duko de Noailles. La angla kuracisto Sir John Pringhle skribas en 1775 tion ĉi koncerne tiun akordon :

« *Ĝis tiam la kutimo por la sekureco de la malsanuloj je la alproksimiĝo de la malamikaro estis ilin translokigi je granda distanco de la batalkampo. El tio rezultis, ke multaj vunditoj mortis sen povi ricevi la flegadon de kuracistoj. Sed grafo de Stair, mia glore fama estro, kortuŝita de tiu malfeliĉaĵo, kiam la armeo restadis en Aschaffenburg, proponis al duko de Noailles (kies humanajn sentojn li konis), ke la hospitaloj de ambaŭ partioj estu konsiderataj kiel sanktejoj kaj reciproke protektataj. Tiun proponon tuj akceptis la franca generalo, kiu profitis de la unua okazo por pruvi sian respektemon de la kontrakto. »*

Estas ankaŭ interese citi akordon traktitan en Brandenburg la 7-an de septembro 1759, do ekzakte unu jarcento antaŭ la fama batalo de Solferino, inter la prusa generalo barono von Buddenbrock kaj la franca generalo markizo de Rougé, laŭ kies vortoj ambaŭ kontraŭbatalantaj armeoj promesas ne nur respekti la lokojn de enhospitaligo de vunditoj kaj malsanuloj, sed ankaŭ ne konsideri kiel militkaptitojn ĉu kuracistojn, ĉu flegistojn.

La imuneco de la hospitaloj stariĝis dum la dekoka jarcento kiel internacia kutimo. La 2-an de decembro 1799 la franca generalo Clément, sieĝata en la urbo Coni, skribis al la princo Liĥtenstejno : « *Mi flirtigis nigrajn flagojn sur la hospitaloj de la urbo kaj mi atendas de via humaneco, ke vi ilin respektigu, kiel mi iam respektis tiujn de la urbo Mantoue. »*

En 1759, do ankaŭ ekzakte unu jarcento antaŭ la batalo Solferino, angla komitato okupiĝis pri la rikoltado de fonduso por povi helpi la francajn militkaptitojn. La raporto de tiu komitato valoras nian atenton ankoraŭ hodiaŭ. Ĝi esprimiĝas tiel : « *Helpi sian malamikon, ĉu ne estas*

*gvidi la homaron al unuiĝo per frata amo, dispelante tiel la rankorojn, kiuj kontraŭmetas la naciojn, kaj ĉu ne estas pretigi tiujn naciojn establi inter si amikecon kaj pacon. »* Verŝajne inter la instigantoj de tiu agado troviĝis kvakeroj, ĉar la tono de tiu teksto kaj la agadmetodo tipe rememorigas la pacismon kaj filantropiecon de la kvakera movado.

La agado de la angla komitato tuj portis fruktojn. En la teksto de la kapitulacio en Montréal, traktita jam la postan jaron, do en 1760, inter la franca guberniestro Vaudreuil kaj la angla generalo Amherst, tiu lasta skribas de la propra mano : « *La malsanuloj kaj vunditoj estos traktataj kiel la niaj* ».

Kiam en la lernejoj edukistoj instruas la historiaĵojn, ili tre malofte lumigas la progreson de la humanecaj sentoj. Tamen tiu progreso kondukis al la naskiĝo de Ruĝa Kruco, kaj poste de Internacia Civila Helpservo kaj de Ligo de Nacioj. La instruistoj devus tamen kompreni, ke la momento lumigi tiun flankon de la historio alvenis.

Henry Dunant en « *Rememoro de Solferino* » prave diras : « *Se tiuj, kiuj mortigas, povas pretendi je gloraj titoloj, tiuj, kiuj flegas kaj kuracas, kaj tio ofte je la risko de sia vivo, prave meritis estimon kaj dankemon.* »

Vi aŭdis prelegon el Svislando de Claude Gacond pri la centjareco de Ruĝa Kruco. Se vi deziras aŭdi la sekvontajn prelegojn pri tiu ĉi temo, ne forgesu kapti la elsendojn de Radio-Svislando.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-